# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 20-an de Majo 2024

**Ĉeestantoj (fizike):** Jehoŝua Tilleman, Inbar Mor, Amri Wandel;
**(zome)**: Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.
**Gastoj** (fizike) Mark Kahn; (zome) Shulamit Tendler (kaj parte Roland Schnell).

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj

a) **Jehoŝua**: kiel ĉiam ELI metis florkronon en la memor-ceremonio en ***Yad-Vashem*** en Jerusalemo, kaj samkiel pasintjare reprezentis nin **Chaja Peer** kaj **Laurin Lewis** – dankon al ili. Pro la malapero de Malka, kiu prizorgadis tion en la pasintaj jaroj, mi mendis la florkronon.
b) **Jehoŝua:** la ***Norda Grupo*** provas reviviĝi, kaj hieraŭ estis kunveno en la domo de **Mikaelo** en Hajfa. Ĉeestis nur 4 personoj, sed ili intencas regule kunveni. La dato de la venonta kunveno estas **merkredo, la 26-a de Junio** – ĉiuj estas bonvenaj.

## 2. Israela Kongreso 2024 (Amri, Jehoŝua)

**Amri** preparis la bilancon de la Antaŭkongreso kaj sendis al **Ŝlomo**, kiu devos kombini ĝin kun la bilanco de la IK. Por tio li devos sumi kaj la enspezojn kaj la elspezojn el diversaj fontoj: la plimulto de la israelanoj pagis kontante surloke al **Jehoŝua**, sed la eksterlandanoj jam antaŭpagis rekte al ELI-konto ĉe UEA kaj tri finpagis kontante en eŭroj surloke al **Amri**. Aliflanke: **Jehoŝua** ĵus pripagis al la hotelo la tutan fakturon el sia konto, dum **Amri** havis siajn elspezojn.

## 3. *Israela Esperantisto* n-ro. 178 (Mikaelo)

**Mikaelo**: mi jam kolektas la materialon. Estas sufiĉe multe, devas elekti, sed ĉia kunlaboro, propono, kontribuoj estas bonvenaj. **Amri**: iu membro (Josi Hofi) skribis, ke li ankoraŭ ne ricevis ***IE-177***. **Jehoshĥua**: mi ankoraŭ ne dissendis, devas fiksi vicon en la poŝto.

## 4. Nia poŝtadreso (Jehoŝua)

**Jehoŝua**: **Avigail**, kiu respondecas pri nia poŝtkesto, informis min pri avizo de antaŭ monato, ke eble nia poŝtofilio fermiĝos. Estas jam la dua fojo, ke ni devos amase avizi pri la ŝanĝiĝo de nia poŝtadreso. Mi do proponas, ke **Amri** demandu ĉe Alon-Turo-2, ĉu ELI, kiel posedanto de oficejo povos ricevi siajn poŝtaĵojn ĉe tiu adreso.

## 5. Landa Kunveno (Jehoŝua)

**Jehoŝua**: ĝi devus okazi hibride en la Oficejo iam komence de Junio, sed ĉar **Amri** forestos en eksterlando, ni devas elekti daton post lia reveno – do **lnnde, la 17-an de Junio, inter la 18h00 kaj 20h00**; mi informos la membraron. **Inbar** jam proponis sian kontribuon, kaj pliaj estas serĉataj. Poste je la 20:00 estos hibrida estrar-kunsido.

**2/…**

## 6. Magazenigo por la libroj de ELI (ŝlomo, Jehoŝua)

a) **Jehoŝua**: la libraro estas ĝis nun plejparte en la kelo de **Doron Modan**. Sed li subite informis, ke dum la proksima tempo li bezonas la lokon; ni devos evakui la kestojn; ne tuj, sed laŭeble dum unu monato.
b) **Eran**: mi trovis magazenon en Kirjat-Ono por 400 NIS monate.
c) **Shulamit Tendler** informas, ke ŝi vizitis la urban bibliotekon de Ĥadera kaj demandis, ĉu ili akceptus nian libraron. La respondo estis pozitiva: ili povus doni al ni unu ĉambreton kun bretaro. Ekestas kelkaj demandoj: ĉu la ordigo, katalogigo, pruntado estu sub ilia respondeco, aŭ sub la nia? Ĉu tiu Esperanto-ĉambro estos vizitebla per la publiko? Post la diskuto inter la diversaj estraranoj formiĝis la jenaj opinioj: (1) la ordigo kaj katalogigo estu prefere ilia respondeco – tiel ili sentos pli da ligiteco al tiu ĉi materialo (ja temas pri kelkcento da libroj). (2) nia membraro devos viziti fojfoje kaj pruntepreni pluajn librojn, por ke la estraro de la biblioteko atentu la interesiĝon kaj la valoron de sia oferto. **Jehoŝua**: eblas viziti kaj helpi, se necesos. **Shulamit**: mi devas demandi ilin definitive kaj ricevi la "verdan lumon". **Amri**: post ilia respondo ni tuj devas zorgi pri kamiono kun laboristo, kiu prenos kaj transportos la libraron el la kelo al la biblioteko. Eble eĉ la biblioteko povas helpi pri la transportado. **Ŝulamit** demandos. **Gabi**: temas pri unika ebleco, kiun ni devas tuj eluzi! Ni povos eĉ arangi la venontan ***IK-2025*** en Ĥadera. **Ŝulamit**: eblas trovi vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵo. **Jehoŝuaj**: tiu ebleco estas pli bona ol ĉiuj niaj revoj pri magazenigo – temas pri vera biblioteko – grandan dankon kaj aprezon al **Shulamit**!

## 7. La venonta IK 2025

Laŭ la supraj konsideroj ĝi okazu en Ĥadera! **Shulamit**: estas taŭga hotelo, ne tro multekosta, kun eblecoj de salono por tiaspecaj eventoj. Mi informos pri detaloj.

**La venonta kunsido**: la 17-a de junio (lunde), tuj post la Landa Kunveno.

*Protokolis: **Gabi Zeevi***